

Justinus Kerner,
Konsolo de l' poet'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Se ne miatombe
Floros karulin',
Tamen floroj roson
Gutos ja sur ĝin.

Kvankam ne migranto
Restas tie nun,
Suben ja rigardas
Nun al li la lun'.

Se ne plu pensadas
Iu hom' pri mi,
Tamen ja memoras
Arbareto ĉi.

Floroj kaj herbejo,
Lun' kaj arbaret',
Memorigas ili ²
Ja pri la poet'.

*Traduko de la Germana poemo "Sängers Trost" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2014-05.*

Arg-1052-2135 (2014-06-17 16:24:03)

²aŭ:
memoradas ili